

LA VERDA LUPEO

26-jaro



17(96) INFORMILO DE ELF-AREK- MARTO 1994

Antaŭ 85 jaroj okazis en Barcelono

la 5-a Universala Kongreso de Esperanto



BARCELONO - Ŝtuparo de l' Placo de la Paco - Dogano kaj Monumento al Kolumbo





UNIVERSALA POŜTUNUIĜO

TARGETA POSTAL — POŜTA-KARTO

MEMORAĴO DE LA V.a KONGRESO DE ESPERANTO OKAZINTA EN BARCELONO EN SEPTEMBRO DE 1909.a



La «Asocio Protektanta de la Instruado Kataluna», cedas la duonon de la benefico de la vendado de tiuj ĉi poŝtkartoj al la Kaso de la 5.a Internacia Kongreso de Esperanto.

La Komitato de la 5.a

EL ARKIVOJ DE ESPERANTISTOJ

BARCELONO
Palaco de la Grafoj de Barcelono. Rigardejo kaj Muzeo de Sankta Agueda



Al

15 poŝtkartoj kun vidaĵoj el la plej interesaj lokoj de Barcelono. Memoraĵo de la V.a Kongreso de Esperanto, okazonta en tiu urbo en Septembro de 1909.a

1.a serio

1 Pta

15 targetes postals, ab vistes de lo més interessant de Barcelona. En recort del V Congrés d' Esperanto, qui tindrà lloch en aquesta Ciutat en Septembre de 1909

1.a serie



NI PRI NI



Kotizo 1994:

La kotizo por 1994 estas: DM 26,-- aŭ egalvaloro (vd. ankaŭ LVL 15(94). La kotizo pagebla ankaŭ per UEA-konto: elfx-r.

ELF-AREK-anoj en ĉi-jara germana E-kongreso en Kiel

En Germanujo nia ELF-AREK havas ĉirkaŭ 20 membrojn . Estus bone, se kongresanoj de la ĉi-jara germana E--kongreso en Kiel, kompreneble ELF-AREK-anoj, renkontiĝos tie. Certe vi renkontos: Burmeister, Hirsch, eble Beau kaj Paulsson. Kunportu interŝanĝan materialon!

Nova membro-statistiko

Lastan statistikon, en LVL, mi malbone kaj fuŝe faris. Beau min atentigis pri iuj forgesitaj, mankis tutaj landoj en ĝi. Nun mi prezentas absolute aktualan liston kun stato de pagitaj kotizoj de novembro 1993. Interkrampe mi notas la nepagintojn:

A 2, B 4 (1), BG 2 (2), BR 5, CH 1, CO 1, CZ 5(3) , D 25 (5),
DK 3 (1), E 5 (1), F 16 (3), FIN 1, GB 4 (1), H 3 (1), I 8 (1),
JPN 3, KOR 4 (4), LT 1, MGN 1 (1), N 1 (1), NL 6 (2), PL 11 (1),
RUS 3 (2), S 10 (2), TJ(CN) 19 (10), US 2, SLO 2 (1).
CZ - Ceĥa Respubliko SLO - Slovakio.

La Asocio de la Germanaj Filatelistoj ricevas 23 ekzemplerojn de LVL.

ELF-AREK en Seulo?

Se por la UK estos noto pri kunveno de ELF-AREK, supozeble estos senkapa kunveno. Nek Hirsch, nek Paulsson, nek alia konata persono ĉeestos la UK`on. Tial: kolektiĝu en la anoncota ĉambro kaj babilu, interŝanĝu, eble iu libervole iomete gvidu la kunvenon kaj faru raporton por la LKK kaj mi. Ne forgesu raporti pri la kongresaj filatelaj eventoj.

ANONCOJ

Interŝanĝas, aĉetas kaj vendas Esperantajn stampojn, tutaĵojn, insignojn, medalojn, glumarkojn, UTK. Serĉas PP-sta. Atendas mankolistojn kaj ofertojn: Stanisław Biesiada, skr. pocztowa 599, PL-42-217 Częstochowa 17.

<u>Serĉas "bestojarajn" filatelaĵojn:</u>
Mi serĉas ĉinajn lunkalendarajn filatelaĵojn el la Simiojaro 1980 kaj el la Kokojaro 1981.

La redaktoro

<u>Esperantaĵoj pri internaciaj kongresoj serĉataj</u>

De internaciaj E-kongresoj de UEA, SAT, IFEF estas serĉataj:
kongresaj glumarkoj, poŝtkartoj, kovertoj kaj tutaĵoj
Rekompence sendas glumarkojn de SAT-kongresoj de la antaŭaj 10 jaroj: Andre Sadier, 22 Av. PV. Couturier Bat. N.D., F-93000 Bobigny (Francio)

Chapellier-kolekton vendas Caphila

Nia amiko Kronshage atentigis antaŭ jam pli longa tempo (pardonu!), ke li ekvidis ĉirkaŭ 3 mil E-filatelaĵojn en la vendejo de Caphila. ILi plej ofte estis adresitaj al nia iama fervora franca membro Chapellier. Jen la adreso: Fa. Caphila, J.P. Kalkstein, 25 rue Drouot, F-75009 Paris. Se vi foje estus en Parizo, kontrolu, ĉu io haveblas.



Nia Gimelli (I) fariĝis 80-jara

Akceptu niajn tre korajn gratulojn okaze de via 8o-jara naskiĝtago! Restu ankoraŭ longe sana, vigla kaj aktiva an nia Esperanto-movado. Koran dankon pro viaj multaj kontribuoj el nia ELF-AREK!

Gratulo al la Ĉina Esperanto-Filatela Asocio

Fine de marto 1994 estas planita la fondiĝo de ĈEFA sub la tegmento de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ni deziras sukcesan laboron kaj esperas pri bona kunlaboro. Ni esperas publikigi detalajn sciigojn pri tio en la venonta LVL.

La redaktoro parolas:

Al ĉiuj tiuj niaj geamikoj, kiuj sendis kontribuaĵojn por nia nuna LVL. Koran kaj sinceran dankon!

Rudolf Burmeister


Novaj membroj:

En la nova jaro ni povis bonvenigi en nia klubo:

D-ro Bellato, Brazilo
Profesoro Bruckmann, Germanujo
S-ro Mandrek, Pollando
S-ro Muhsal, Germanujo

Se vi deziras iujn anoncojn, sciigu la tekston al la redakcio.

EKSPOZICOJ KAJ NI



Tutlanda ĉina pm-ekspo CHINPEX en Beijing/Peking

En tiu tutlanda pm-ekspo en Beijing, okazinta dum novembro 1993, partoprenis tri ĉinaj ELF-AREK-anoj:

-Lu Chengzi kun la ekspozaĵo:"Granda persono de unu generacio -Mao Zedong-". Arĝenta medalo.

-Cao Xionglin kun la ekspozaĵo:"Apliko kaj evoluo de Esperanto". Arĝentumita medalo.

-Zhou Zhiqi kun la ekspozaĵo: "La Hundo- fidela amiko de la homaro". Kupra Medalo.



La "Ĉina Filatela Gazeto", decembro 1993, aperigis liston pri la montritaj ekspozaĵoj kaj la akiritaj medaloj.

Ni tre kore gratulas al la ekspozintoj! Dankon pro la senditaj informoj al Cao Xionglin kaj al ĈKG pro la sendita ekspo-filatelaĵo kaj informoj pri ĉiuj akiritaj medaloj.

Ekspo Olsztyn (PL) (Mikulski)

Tri-urba fila-ekspo okazis en novembro 1993 en Olsztyn. Nia J. Mikulski prezentis sian E-filatelan ekspozaĵon en la "Honora Korto", loko de "super-ranga" ekspozaĵo. Ni kore gratulas al nia Mikulski pro la jam 34-a elmontro de sia filatelaĵo. Krome: dankon pro via interesa letero!


Ekspo Mainz 1993 *********** (James Rezende Piton)



En la germana urbo Mainz okazis la 01 -03 de oktobro 1993 la brazila-germana pm-ekspo en la dua rango. La junulara fako de la Brazila Filatela Asocio sendis la E-filatelan ekspozaĵon de nia Piton. La ekspozaĵo ricevis 89 poentojn, el 100 eblaj, kaj ricevis ateston en la rango de "ORA MEDALO". Estis la lasta medalo por nia Piton en la "junulara klaso", ĉar li nun jam superas la aĝlimon de 21-jaroj por tiu klaso. Ni tre kore gratulas pro la Ora Medalo. Sendube ĝi kronas la ĝisnunan epokon de li. Krome ni deziras, ke li ankoraŭ ofte havos la eblecon, kvalite propagandi nian Esperanton en la kadro de tiaj ekspozicioj.



STAMPOJ



TJ 1993 - 21 (NET) Sportkunveno (Haikou)



Haikou, 1993 majo 05,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA I-a ORIENTA AZIA SPORTKUNVENO
Bildo: Emblemo kaj 2 sportistoj.
Uzita de PMK Haikou. Desegnis: ZLR.

TJ 1993 - 22 (NET) Patriotaj Demokratoj (Haikou)



Haikou, 1993 majo 15,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA PATRIOTAJ DEMOKRATOJ DE PR ĈINIO
Bildo: La ĉina muro en koro.
Desegnis: ZLR.

TJ 1993 - 23 (NET) La Bambuoj (Haikou)



Haikou, 1993 junio 15,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
La BAMBUOJ
Bildo: Bambuo.
Uzita de PMK Haikou.
Desegnis: ZLR.

TJ 1993 - 24 (NET) Pejzaĝoj (Haikou)



Haikou, 1993 julio 20,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA PEJZAĜOJ EN CHANGBAISHAN
Bildo: Akvofalo. Desegnis: ZLR.
Uzita de PMK Haikou.
Ankaŭ uzita sept 03 pro prokrasto de la emisio de la koncernaj poŝtmarkoj.

TJ 1993 - 25 (NET) Filatela Tago (Jiangmen)



Jiangmen, 1993 aŭgusto 01,
Teksto nur en Esperanto:
LA I-A FILATELTAGO DE JIANGMEN
Bildo: Sama teskto en ĉinaj ideogramoj en pm. (skribmaniero: ĝuan).
Uzita de PTO Jiangmen. Desegnis: ??

TJ 1993 - 26 (NET) Sportkunveno (Haikou)



Haikou, 1993 septembro 04,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 7-A SPORTKUNVENO DE PR ĈINIO
Bildo: Kuranto kun torĉo antaŭ la cifero "7".
Uzita de PMK Haikou.
Desegnis: ZLR.

TJ 1993 - 27 (NET) Grotoj (Haikou)



Haikou, 1993 septembro 05,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA LONGMEN-AJ GROTOJ
Bildo: Preĝanta homo.
Uzita de PMK Haikou.
Desegnis: ZLR.

TJ 1993 - 28 (ET) Per Esperanto por liberigo (Beijing)

Detalojn vd. en LVL 16(95) sur paĝo 4.

TJ 1993 - 29 (NET) Abelo (Haikou)



Haikou, 1993 septembro 21,
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA ABELO
Bildo: Abelo en cirklo, triangula stampo
Uzita de PMK Haikou. Desegnis ZLR

TJ 1993 - 30 (NET) Olimpiko 2000 (Changshu)




Changshu, 1993 septembro 23.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto.
LA 27-AJ OLIMPIKOJ OKAZU EN 2000-A JARO EN PEKINO
Bildo: Olimpikaj ringoj kaj blazono.
Uzita de PTO Changshu.
Desegnis: ZLR

TJ 1993 - 31 (NET) Filatela ekspozicio (Jiangmen)



Jiangmen, 1993 oktobro 02.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA RONDIRA FILATELA EKSPOZICIO PRI MAO ZEDONG EN JIANGMEN KAJ 5 URBOJ OKAZE DE LIA 100-A NASKIĜ-DATREVENO
Bildo: pm kun Mao-portreto kaj floroj.
Uzita de PTO Jiangmen.
Desegnis: gesamideanoj Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.

Ili estas ankaŭ kreintoj de la poŝte eldonita E-memorkoverto (sen pm). (vd. venonta paĝo)



TJ - 31 Filatela ekspozio en Jiangmen
Esperantlingva -memorkoverto

TJ 1993 - 32 (NET) Lakaĵo (Lanzhou)



Lanzhou, 1993 oktobro 20.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
ĈINA ANTIKVA LAKAJO
Bildo: Vazo.
Uzita de Xiqu-a PMK.
Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.

TJ 1993 - 33 (ET) Esperantisto Tikoŝ (Beijing)



Beijing, 1993 novembro 06.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto.
LA DEKA MORT - DATREVENO DE TIKOŜ LA TORĈTENANTO DE LA ĈINA ESPERANTO - MOVADO
Bildo: Portreto kaj torĉo kun E-stelo.
Uzita de Xiqu-a PMK.
Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.

El la de ĈKĜ sendita Tikoŝ-biografio mi ĉerpis jenajn faktojn: Tikoŝ (Fang Shanjing 1907 02 21 - 1983 11 06) aktivis dum ĉirkaŭ 60-jaroj en la ĉina Esperanto-Movado. Li verkis multajn literaturajn verkojn, redaktis E-gazetojn, fondis lokajn E-klubojn kaj landan organizon. Li ankaŭ fondis la Xinhuan Korespondan E-Lernejon. Li ankaŭ aktivis dum malfavoraj tempoj. Aperis libro pri li. En la 71-a UK unu salono portis lian nomon.

Iniciatis la stampon kaj verkis la biografion:
Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio (Ĉin Kajĝi)
Guanyan 2-7-201, CN-100034 Beijing, PR China.

****

Cetere: Ĉu vi jam konas la grandan katalogon de ELF - AREK?


TJ 1993 - 34 (NET) Mao Zedong (Beijing)



Beijing, 1993 novembro 16.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 100-A NASKIĜ-DATREVENO DE KAMARADO MAO ZEDONG:
Bildo: Portreto, emblemoj de komunista partio.
PR Ĉinio kaj Cina Popola Armeo, 10 floroj.
Ideogramoj sub la portreto: "Servi al la popolo".
Uzita de PMK (PTO?) Beijing, ankaŭ por la samtage aperinta pm-bloko (5 juanoj).
Desegnis: Tan Ailing kaj Xie Shaoxing.

TJ 1993 - 35 (NET) Guo Moruo (Beijing)

Beijing, 1993 novembro 16, teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 101-A NASKIĜ-DATREVENO DE GUO MORUO:
Bildo: Portreto. Apude ideogramoj: "Refreŝigon, sukceson kaj komencon de pli da sukceso".
Tiujn vortojn skribis Guo Moruo por sia poemaro "Ekfloru Cent Floroj".
Uzita de PMK Beijing-Xiqu-a. Desegnis: Tan Ailing kaj Xie Shaoxing.



Lige kun tiu memorstampo mi trovis sur la poŝtkarto duan ornaman apudstampon kun la teksto en la ĉina kaj en Esperanto: LA 100-A NASKIG-DATREVENO. Eble oficiala, simila al tiuj de BR 2-10. Sekvontnumere ni informos vin pri tio.


TJ 1993 - 36 /NET) Mao Zedong (Haikou)



Haikou, 1993 novembro 16.
Teksto en ĉina kaj en Esperanto:
LA 100-JAR-JUBILEO DE LA NASKIĜO DE PREZ. MAO:
Bildo: Portreto
Uzita de PMK Haikou
Desegnis: ZLR



TJ 1993 - 37 (NET) Generalo Jang (Haikou)



Haikou, 1993 novembro 26.
Teksto en ĉina kaj Esperanto: la 100 JAROJ DE LA NASKIĜO DE GENERALO YANG HUCHENG:
Bildo: Portreto.
Uzita de la PMK Haikou.
Desegnis: ZLR:

En la sama tago aperis samtema pm.

TJ 1993 - 38 (ET) Mao Zedong (Beijing)

Beijing, 1993 decembro 26.
Teksto en ĉina kaj Esperanto: LA 100-A NASKIG-DATREVENO DE KAMARADO MAO ZEDONG.
Bildo: Portreto, 10 floroj, E-stelo, pagoda turo.
Ideogramoj mane skribitaj de Mao: "ESPERANTO ESTAS LERNINDA KAJ LERNENDA".
Uzita de PMK Beijing-Xiqu-a por samtage aperinta pm-serio.
Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.



TJ 1993 - F + G

TJ 1993 - 39 (ET) Mao Zedong (Beijing)



Beijing, 1993 decembro 26.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto.
LA 100-A NASKIG-DATREVENO DE KAMARADO MAO ZEDONG:
Bildo: 2x 10 floroj, turo kun E-stelo kaj de Mao mem skribitaj ideogramoj kun apuda E-traduko: "Mi ankoraŭ tiel opinias, ke Esperanto estas lerninda kaj lernenda, se oni uzas ĝin por vera internaciismo kaj revolucio Mao Zedong 1939-12-09"
Uzita de PMK Beijing-Xiqu-a. Desegnis: Tan Ailing kaj Xie Shaixing.



TJ 1993 - 40 (NET) Mao Zedong (Changsha)



Changsha, 1993 decembro 26.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 100-A NASKIĜ-DATREVENO DE K-DO MAO ZEDONG:
Bildo: Montaro kaj naskiĝdomo de Mao Zedong.
Uzita de PMK Hunan. Desegnis: Yang Jian-qing.

Samtage aperis du samtemaj pm. PMK eldonis ankaŭ grandformatan E-UTK (EJ I-2) kun reproduktaĵo de la Mao-eldiro pri Esperanto.

100044





毛泽东同志诞生一百周年 北京东公庄西路35号10-1-3

秦凯基 收

湖南省邮票公司



LA 100-A NASKIĜ-DATREVENO
DE K-DO MAO ZEDONG
1893-1993

（一九三九年十二月九日毛主席写给「延安世界语者」的题词）

Mi ankoraŭ tiel opinias, ke Esperanto estas lerninda kaj lernenda, se oni ĝin uzas por vera internaciismo kaj revolucio.

Grandeco: 25x17,5 cm

410005

Rekomendite sendita E-UTK kun E-stampo kaj ekspeda kaj alvena stampoj

000119

dorsflanko



《毛泽东同志诞生一百周年》纪念封

为纪念毛泽东同志诞生一百周年，缅怀毛泽东同志对世界语运动的关怀和支持，特发行汉文、世界语对照纪念封一套，全套两枚，首发日期为：小型张纪念封11月16日，邮票纪念封12月26日。

KOVERTO MEMORE AL LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜTAGO DE K-DO MAO ZEDONG

Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝtago de k-do Mao Zedong kaj lia prizorgo al la E-movado en Ĉinio, la Ĉangsha-a Esperanto-Asocio kaj Hunan-a Poŝtmarka Kompanio kune emisiis du memorkovertojn kun tekstoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La emisia dato de la unua kun miniatura folio de memoriga pm. estas la 16-a de nov. 1993 kaj tiu de la dua kun memoriga pm. estas la 26-a de dec. 1993.

设计：杨健清
Projektinto: Yang Jian-qing

长沙市世界语协会 湖南省邮票公司发行 (EJ1-2)

TJ 1993 - 41 (NET) Mao Zedong (Changshu)



Changshu, 1993 decembro 26.
Teksto en ĉina kaj Esperanto.
LA 100-JAR-JUBILEO DE NASKIĜO DE
PREZ. MAO:
Bildo: Portreto
Uzita de PTO Changshu.
Desegnis: ZLR

TJ 1993 - 42 (NET) Mao Zedong (Changshu)



Changshu, 1993 decembro 26.
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:
LA 100-JAR - JUBILEO DE PREZ.MAO.
Bildo: Portreto
Uzita de PTO Changshu.
Desegnis: ZLR

TJ 1993 - 43 (NET) MAo Zedong (Haikou)




Haikou, 1993 decembro 26.
Teksto en ĉina kaj Esperanto:
LA 100-JAR - JUBILEO DE LA NASKIĜO
DE PREZ: MAO
Bildo: Portreto
Uzita de PTO Changshu.
Desegnis: ZLR.

A F R A N K S T A M P O J

AF por la 67-a SAT-Kongreso

Tiu afrankstampilo funkcias (eble) ekde 01 12 1993. Iom strange la dekstra parto kun la nominala indiko. Post la komo montriĝas 3 lokoj, sed ja nur povas ekzisti 2 nuloj. Tamen por ni absolute seninteresa fakto. Nin interesas la tp kun ĝia bela desegnaĵo pri E-balono.
Informo de Hasala, dankon!

Franca stampo "HEROUVILLE 93" ankaŭ kun "PP"






Nia Amouroux trovis tiun stampon kun "PP" en la datstampo.

PP = Port Paye (afranko pagita)

Bedaŭrinde la informo pri tiu stampo venis tro malfrue por eniri en la katalog-suplementon 94.

Afrankstampo de la kategorio II el Pollando







Ekde 1993 la "eldonejo ABC" en Varsovio uzas afrank-maŝinon. En la tp troviĝas la adreso kun la strato: Zamenhofa 1.

Certe interesa informo de nia Biesiada. Dankon al li.

Bielak: Dato de PL 11 estas en la katalogo kun ne korekta dato



Nia amiko Bielak foliumis diversajn sta-katalogojn kaj trovis, ke tiu stampo en ĉiuj katalogoj estas notita sub la dato "aŭgusto 1962" aŭ "24-31.8.1962". En la ELF-AREK-katalogo de 1990 kaj en mia katalogo de 1983 troviĝas la dato: 15. 12. Tiu dato baziĝas sur mia posedaĵo (Burmeister). Neniam mi vidis alian sta-daton, krom la notoj en la katalogoj. Krome, post apero de la dato 15.12. en la katalogo de 1983 ne venis atentigoj pri tiu nekorekta dato. Nia Bielak skribis ankaŭ, ke nia Mikulski posedas tiun apud-stampon kun la ds 2.9.62 de Warszawa 3 (!!). St. Fischer havas stampon kun la ds de 18.12.62 de Warszawa 1.

El tio mi konkludas, ke PL 11 vere estas uzita la 24-31.8.62 en la poŝtejo Warszawa 1. Ĉiuj aliaj datoj estas poste aldonitaj, kio estas ja facile farebla afero.

Kiu posedas la sta PL 11 kun datoj inter 24-31.8.62? Mi supozas, ke mia posedaĵo certe estas originala, sed tiu nuliga stampo estas farita poste. La stampilo certe ne cirkulis dum 4 monatoj tra diversaj poŝtejoj! Cetere, tiu peco, kiun mi montras, tute ne uzeblas por ekspozaĵo, ĉar ĝi estas farita "kompleze". Por mia albumo ĝi taŭgas (ds: nuliga datstampo).

Rimarko de Hirsch: La aŭgustaj datoj certa estas ĝustaj, ĉar la jubileo ja estas ligita al la apero de Esperanto en julio 1887. La dato de 15.12.62 laŭ mi, certe estas reuzo, ĉu fakte aŭ kompleze, okaze de la naskiĝdato de Zamenhof.

Trovita



Esperanto-stelo el la jaro 1895

Nia Jan Niemann trovis en fila-bazaro poŝte senditan karton el la jaro 1895 kun E-stelo en la adresstampo de la ekspedinto, s-ano



Simon Juif. La karto estis sendita al sveda Esperantisto. En la Enciklopedio de Esperanto (EdE) legeblas, ke nia verda E-stelo fontas el ideo de Beaufront el la jaro 1893. Do, tre interesa filatelaĵo el al frua tempo de nia Esperanto-movado. Gratulon pro via interesa TROVITAĴO kaj dankon pro la senditaj informoj al Jan Niemann.

Finna prezidento en poŝta stampo



Nia Terttu Österman trovis kaj sendis poŝtan portretan stampon pri la unua ŝtata prezidento de Finnlando, K.J. Stahlberg. Li estis la Alta Protektanto de la 14-a UK, 1922 en Helsinki. Unuafoje en la historio de la UK-oj okazis, ke ŝtatprezidento per bankedo regalis ĉiujn kongresanojn.

Koran dankon pro tiu interesa informo al nia Terttu Östermann.

NUMISMATIKO



Broŝuro pri Esperanto - mono de Jankowski

Jam dum multaj jaroj nia JANKOWSKI okupiĝas pri la E-numismatiko kaj en februaro 1994, pere de LIBERA ESPERANTO-ASOCIO por germanlingvaj regionoj, aperigis broŝuron pri ESPERANTOMONO. Enkonduke li skribas:

> "...Tiu ĉi broŝuro memorigu pri la klopodoj de Esperantistoj krei universalan monosistemon kaj estas dediĉata al la pioniroj de la Esperanto-mono: Saussure, Höveler, Uitterdijk kaj Cseh. La klopodoj por krei universalan monosistemon....celis faciligi komercajn kaj interŝanĝajn rilatojn inter Esperantistoj..."

La broŝuro rakontas pri la sistemo spesmila el la jaro 1906 , farita de SAUSSURE, pri la "Internacia Helpa Mono" de TELLINI kaj BORD fine de 1907, pri la "CEKBANKO ESPERANTISTA" de HÖVELER de 1907 aŭ 1908, pri la spesmila moneroj de 1912. Rakontas pri la "UNIVERSALA SPESMILA BANKO de UITTERDIJK kaj HENGEL kun monbiletoj de 1/2, 1, 2, 5, kaj 10 SPESMILOJ. Krome pri la STELOJ de UNIVERSALA LIGO de 1946

(1 Stelo valoris kilogramon de pano), 1960, 1965. Nia Jankowski montras monbiletojn pri Tito, Suttner, Borel kaj Ciolkovski, oficialajn monerojn pri ZAMENHOF kaj UK en Kubo. En la broŝuro aperas faktoj pri la ESPERANTISTA RESPONDKUPONO; eldonita 1926 de UEA, pri kotizmarkoj de IKUE, de GLEA kaj de GEA, pri BRIKOJ de BEA kaj PEA kaj eĉ pretertuŝe pri mono de ATLANTIS. Do, renkonteblas abundo da faktoj riĉe ilustritaj. Se vi ĝin akiros kaj havas iujn rimarkojn, direktu ilin al:



René de SAUSSURE
(1868 - 1943)

Johannes JANKOWSKI, Am Wemphof 9,
D-44379 DORTMUND


En la broŝuro la aŭtoro demandas:

--Kiu posedas bla 2-spesmilan moneron de 1912?

--Kiu konas la eldonkvanton de la 5sm-moneroj de 1912?

--Kiu konas detalojn pri la UNIVERSALA SPESMILA BANKO kaj la kolorojn de la spesmilaj biletoj. Lastfoje ili videblis 1980 en ekspozicio de la Hilversuma E-grupo, poste ili malaperis?

--Kiu posedas 25-spesmilan moneron?



Ĉeko de la ĈEKBANKO ESPERANTISTA de 1908



Bankbiletoj de la Universala Spesmila Banko starigita en 1927.





Argentmonero de 1 Sm. eldonita okaze de jubileo 25 jara de E.

GLUMARKOJ











Nekonataj glumarkoj de CERVELLO

En decembro 1993 nia Jankowski sendis kopiojn pri glm-serio, eldonitaj de nia forpasinta amiko CERVELLO. Surprizis min 3 nekonataj glm el la jaro 1985:

> 75-a Datreveno de la 6-a UK Esperanto, Washington 1910 (1985)
> 3 variaĵoj kun portretoj de usonaj prezidentoj: JEFFERSON; LINCOLN kaj ADAMS.

Kiu povas sendi datojn pri ili (koloroj, gumo, dentumado)

Krome aperis, sed parte mankas detalaj informoj



1



2



3

(1) XV Ĉebalta Esperantista Printempo

Nia Hirsch trovis sur letero al GEA tiun glumarkon. Kun supra teksto kaj noto: MIELNO 6-12,o6. 1993. Bildo: E-stelo.

(2) 72-a Germana Esperanto-Kongreso en Kiel (20.-23. 05. 1994

Nia Hirsch eldonis tiujn glumarkojn en du mezuroj sur memglua papero. (Folio: 3x8= 28 pecoj kaj folio 2x5= 10 pecoj).Nigra blanka. En la bildo: Velboatoj, urbdomo kun ĝia turo, tur-kranoj de ŝipfarejo.

(3)67-a SAT-kongreso en Stražnice

Trovita sur letero de Paulsson. Nigra-blanka sur memglua papero. Nekutima bildo: Nova landlimo de Ĉeĥa Respubliko. Sude montrita la kongres"urbo" STRAŽNICE apud la limo al la Slovaka Respubliko. Nun vera ŝtatlimo kun dogano kaj kontrolo. Mi ĝin spertis pasintjare dum aŭtoveturo al Hungario kun tre granda surprizo. Dato: 16-23.7.1994.

Pliaj glm sekvos en la venonta LVL. Kontribuis: Paulsson, Hirsch, kaj Jankowski.

La SUPLEMENTO 1994

por la Granda Katalogo de

ELF – AREK estas preta

Prezo: DM 17,-- + afranko (9 IRK)

Estimataj/Karaj ge-kolektamikoj!

Depost la apero de nia katalogo ni jam forvendis sufiĉe multajn ekzemplerojn. Bedaŭrinde mi devis konstati, ke nur unuopaj gesamideanoj mendas la ĉiujare aperantajn suplementojn. Tial la plej multaj katalogposedantoj nun ĵam havas tute malaktualajn katalogojn. Ni tre bedaŭras tion. Ĉar mi nur pretigas la eldonkvanton laŭ la enirantaj mendoj, mi ne povas postliveri suplementojn de la antaŭaj jaroj.

Nur tri ekzemploj:La ĉinan parton de nia stampkatalogo ni tute novkompilis. Ni partigis la stampojn en "Esperanto-temaj" stampoj kaj "Ne-Esperanto-temaj" stampoj, sed kun dulingva enskribo: ĉina kaj Esperanto. Krome ni novkompilis la lastajn jarojn de la glumarkkatalogo. Al la parto:"Poŝto de Esperantistoj dum kaj post la Ia kaj IIa mondmilitoj" venis nova, interesa materialo.

Do, ni atendas vian mendon kaj sendu ĝin al:

Richard Hirsch. Lambertstr. 12, D-36251 Bad Hersfeld

Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe Esperanto
i. BdPh e.V.

Redakcio ĉe: *Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62*
D-09123 Chemnitz
Prezidanto: *Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29*
S-17144 Solna
Kasisto: *Rolf Beau, Jacobstr. 9*
D-04105 Leipzig
Banko: Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320
Bankkodnr(BLZ): 860 555 92
Kotizo ek de 1994: DM 26,-- /13 IRK
Stampobanko: *Werner Heimlich, Fröbelstr. 4*
D-29614 Soltau
Kompostis+ ekspedis *Richard Hirsch, Lambertstr. 12*
D-36251 Bad Hersfeld
Presado: *Albert Oesterle, Hubertusstr. 28*
D-86650 Wemding

UEA - Konto de ELF - AREK: elfx-r